

PENSEO

N-ro 359

sept. / 2021

Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 32-a jaro <http://www.elperno.cn/penseo/penlisto.htm>

Maria Nazaré Laroça (Brazilo)



Semado


Ni estas semoj el lumo,
kiujn Dio iam plantis
en la ĝardenojn de l' Eterneco.
Vivo ne doloras,
ni nur bezonas kunvivi
kun la ekzistdolor'
êe l' malfortikeco
de niaj limoj.

Do mi memoras sopire
la naivan lernejan kanton,
kiu ĉiam plorigis min:
"semeto kompatinda,
kun tiom da ĝojo
mi ekplantos vin nun
en la malluman grundon,
sed mi ne vin forlasos,
mi ĉiutage venos
surverŝi sur vian bedon
per malvarma akvo... "

Kiel doloras ekzistado!

Juiz de Fora. 18/08/2018.

Iskouhi Avetiĝian (Francio)



Protektu la Patrujon!

Jam ĉesas verŝi la plorojn!
Ekstaru! kontraŭ malamiko,
Pripensu, pri viaj gepraavoj,

Kiuj testamenis al via la Teron!
Amo kaj fido por Patrolando
Donacite de la Granda Dio,
Kiu vin protektas, kiel anĝelo;
Prenu l'armilon! defendu landon!
Ne timu! La ruzec', l'aroganc'
Estas lia plej grava armilo,
Sed antaŭ la kuraĝa soldato,
Certe, li forkuros, kiel uragano!
Oni legas pri via nacia historio
En la valo de la monto Ararato,
Dia donaco estas Sankta Tero,
Ne obeu al la turka jatagano*!

*iatagano: spado, ponardo, sabro

Siranush Slagmulder (Francio)



Mi estas...

Mi estas la virino de la alta montaro,
Ŝatanta lagojn korsimilajn, puran lazuron,
Mia vojaĝo ekkomencis kun Noa ŝiparo
Por desegni fekundan kaj sanktan teron!
Mi pentris la altajn montarajn valojn
Florojn! la papavojn kaj la mirtelojn,
La ardaĵ songoj senĉese min vizitas;
Por renkonti tagiĝon, kiu la teron tuŝas,
Mi brodas kaj beligas la belan papilion,
Ke la Suno translokiĝas sub sia brilo,
L'amo, la junec' tremigas ŝiajn flugilojn
Vidis vi ŝiajn kurbojn ebriajn pro frenez'?
Mi estas la muz' de florigantaj kolinoj
Etenditaj sur belege vestitaj montoj
Velura rigard' karesas sian noblecon
Flosante pro la ebrieco en la montoj.
Mi estas la sinjorino de la altaj montoj
Vojaĝante el profundo de l'antikvaj

jarcentoj
 Mi alportas mian ĉioscion kaj mian
 linvgon
 Tenu mian manon, ŝatu min, mi estas
 Armenujo!

09/08/2021

Siv Burell (Svedio)



Se iu solas dum Kristnask'

Se mi solas dum Kristnask'
 mi sentas min premata
 sed aliflanke — ĉu estas mia task'
 zorgi pri solulo, kunece malsata
 Mi silentigas la konsciencon tiel
 ke ne eblas zorgi pri ĉiuj iel.

Plej bonas la senriska labortago
 kun nur la propra famili'
 eviti pensi pri ĝena ago
 malfermi sian domon pro sci'
 ke iu bezonas nin
 la tipa svedo evitas ĝin

Ni pretas al ioma subten'
 per impostoj sufiĉe altaj
 sed homo en anima pen'
 bezonas iun alian
 Mankas kunparolanto
 do haltu kaj pregu
 ke ĉiu svedo estu kunfratanto
 vekiginta el dorma vanto.

VOJMONTRILOJ

Estus gajninde
 pensi ke viveventoj
 povas instrui lerninde
 ke mi kredu je miaj sentoj
 kiuj estas sendaĵoj
 de Dio, pri la vivaĵoj!
 Tutcerte estas tiel!


Jadranka Miric (Serbio)



Floralogo

Mia balkona florgardeno
 gajigas min. Via vizaĝmieno
 reflektiĝas en okuloj viaj ,
 migdalaj, bluaj kaj brilaj.
 Fajretoj kaj varma rigardo
 esprimas vian amon. Viaj
 lipoj ruĝetas de via korardo.
 Similas tute al la miaj.
 Etendiĝas manoj miaj
 por akcepti vin en mia brakumo.
 Delogita estas mi de okuloj viaj
 forgesis mi pri la pasia florpharmo.
 Estas serĉata
 Saluto kaj laŭdo!
 Fortas brakumo kaj aplaŭdo!
 En la manoj verda flago,
 tuŝanta koro mia pro via mago.
 Sur brusto stelo alkroĉita
 nenio estos perdita!
 Brilo en okulo!
 Salutas vin via verdulo!
 Estas vane serĉi vin,
 telefono ripetas “tu, tu” ĝis la fin’.
 Kie ŝi kaŝis sin?
 Mi serĉis ĉie ,
 “ĉu belulin’ loĝas tie?”
 Montris mi la foton al ĉiu viapoze ,
 ja, vere serĉis mi vin tutserioze !
 Neniu sciis respondi al mi
 Kie malaperis vi !
 Eble translokiĝis vi sekrete.
 Trovos mi vin interrete!

Elena Popova (Bulgario)



EMOCIOJ

Printempa buked' —
 heliantoj en vazo.

La suno tristas...

*

Papavoj en la
okuloj de l' somero!
Nedaŭra belec'.

*

Rozoj malgajas
pri amantaj okuloj.
Falas folioj...

*

Memor' el Balçik
kun vojeto al la maro.
Somera invit'.

*

Abocolibro
en la infanaj manoj.
La mondo ekkantas.

Tulipo

Sen sin klini
al la suno juna,
la flor' promesis
tason da roso.
Mi jesas:
La sunaj lipoj
trinkis kaj kisis
la belan tulipon.
La birdoj bisis
la teneran kison.



Marija Mikicej



por ni anstataŭe
jam restas ne ondo ne nub' sed papav'
de iu sur pad' en mallum' disŝetita
vi scias
ke estas ĝi tie — grajnetoj por ni nevideblaj—
en çiu jam floras la visko de mia forgeso

kaj jam nereveno en çiu vidiĝas
ŝlosilo de malemo
indico de l' finado
vi aŭdas
ke l' noto l' plej longa per sono tre alta
forlavas la tuŝojn de l' noktoj frenezaj
ke per la tagiĝo marŝaŭmo surhaŭtiĝas
vi vidas
ke mi subordiĝas denove
en mito alia



ilustrita de Olena Jasinska

Elukrainigis



Petro Palivoda
(Ukrainio)

Mimoza Ahmeti



Vi silentos

Vi longe silentos tiun tagon
Eble tute tiun nokton,
Kiam ne estos
Sur la perdita Tera sfero
Mia fiera figuro
Kun potencaj, kvazaŭ birdaj okuloj
Kiu nur al la libero apartenas,
Kiujn tiom multe mi amis.

Vi silentos, junulo,
Vi silentos, spiritulo,
Kiam mi ne plu estos.
Kaj via mentono, apogite sur la klaviklo,
Eksilentos.

Ho, ne plu estos tiu silento
Unu el tiuj, vibrantaj la proksimiĝon.
Tiu granda silento,
Tiu silento de la malçeesto,

Tiu silento de via reveno,
Unuope, unuope, unuope.
Vi, kiu ĉiam duope kun mi estis,
Kaj denove unuopita,
Sed viro, filo de soleco.

Vi silentos,
Vi, kiu tiom malmulte parolis kaj la
silentojn fendetis,
Vi kiu la parolojn kvazaŭ rarajn konkojn
havis,
Por kiuj tiom longe mi serĉis.
Silentos vi, kiun tiom multe mi amis,
Revenos vi en viron kiel miloj
(neniam finiĝas la dungitaro manĝante
virojn).

Silentos vi. Leviĝos. Foriros ekde tie,
Brakrompite, al la buŝo de la dungitaro vi
foriros
Malgrandigante la korpon, la skapolojn je
distanco
(Min frapu apopleksio, kiom forte mi amis
viajn skapolojn!)

Foriros mia dungito, malaperos,
Kaj ĉi tie nia historio finiĝos,
Nia neaŭdita historio
Kiun subaŭskultis la belaj steloj
kiujn ni kaptis per mano sub la tegmento.

Ekirante de la patrino

Neniam mi diri la veron pri vi kuraĝis,
Neniam mia braveco vin alfronte staris.
Patrino- amo, forgeso, neglekto,
Neatendita memoro ke vi en la mondo
ekzistas,
La monon, sendu monon, bluzojn, kamizolon
kaj...
Mi vin ĉirkaŭprenas.

Vi neniam prijuĝos min,

Vi neniam pardonos min, ĝiskiam ne prijuĝos
min,
Duoble pli peza kaj hontinda por mi ĉi tio
estas
Nenio viajn krurojn ligniĝintajn riparas
Kaj la ŝvelintajn manfingrojn...

Ne temas pri mia pardonpeto. Temas
nek diri ke por mi la plej kara en ĉi tiu mondo
vi estas.

Mi malkaŝi vian devigitan bestiecon volas
Pro la hejmo, lavado, littukoj, pulvoroj kaj
rubajoj,

Mi volas malkaŝi la barbarecon de la frapoj
sur via vizaĝo,

Viajn ploradojn, singultojn, ĉagrenon de la
mamoj,

La frapon per ferbastoneto al la suroj, kia
teruro, mi bone rememoras

Kiam tion la patro faris,

Vian disrompiĝon, lastlaste. La falo de virino
Estas identa al la disfalo de imperio.

Komencis vi bati nin tiam

Kaj via bruado la bolkruĉajn sonojn ripetadis,
La kunfrapadon de la teleroj

Kaj la kokinblekon de la kokinejoj pretere...

Vi forpelis la amojn kune kun la patro.

Kun la ikonoj de la onidiroj en la manoj

Kiel du jezuitoj de la honoro

Sturmis vi al la malpiaĵoj de nia interkisoj.

Kunfrapigis al la muro tiom, kiom la kapo de
la kisoj krevis.

Forĵetis en disput fornojn (obskurecaj
juĝprocesoj de la Mezepoko

Nenio estas kompare al ili).

Poste, ĉar ne sukcesis, strange, nek vi, patrino

Ne sukcesis,

Fariĝis vi niaj sklavo, ekzempluloj, ĝisfine.

Elalbanigis



Bardhyl Senimi

(Albanio)

El Ĉina Antikva Poezio

Zhu Dunru (1081-1159)

—laŭ melodio *Feo ĉe rivero*

Ekde urba falo,
kiel la spegul' rompita
ja disiĝis da geedzoj aro.
Disapartigataj de distanc' forfora
ili ja mesaĝas pli en raro.
Ni nur sonĝe venus al hejmloko,
kaj ĉagrenas en amara galo.

Luno povas rerondiĝi,
steloj kolektiĝi kune.
Kial mi ankoraŭ ŝin ne vidas
jam reveni ja delonge nune?
Ĉi-printempe la kukul' kukuas,
ĉiujare migrobirdoj flugas enaŭtune,
mi rigardas ilin fojrefoje,
ve, ĉijare dek kvar fojojn sume.

—laŭ melodio *Ĝojo de intervidiĝo*

Mi ascendas l' okcidentan turon de la urbo,
min apogante sur la balustrado
por rigardi en aŭtuno klare.
Sub la suno subiranta la rivero
fluas torentante ja senbare.

Centro de la regn' tumultas pro milito,
familioj jen disiĝas senkonsole.
Kiam la perdita teritorio
rekaptiĝos de la regno? Blovu, vento,
miajn varmajn larmojn foren kun manio.

—laŭ melodio *Perdrika ĉielo*

Regant' mi estas
de montoj kaj riveroj sub ĉiela
imperiestro, la plejalta moŝto.
Denaske kun humor' libera
mi ja langvoras, folas.
Mi iam per edikto fera
komandis venton kaj matenajn rosojn,
ordonis al nubaro bela

promeni malrapide.

Mi tamen ŝatas versi verve
kaj drinki ĝis kontento.
Neniam en okulojn metas
mi korteganojn per atento.
Mi eĉ ne volas iri ofte
al la palac' kun diligento.
Volonte nure mi ermite
laŭplaĉe resti en silento.

—laŭ melodio *Salikbranĉo*

Sur bordoj suda, norda
salikoj sin prezentas verd-prospere.
Ĉi tie oni salikbranĉojn jen deŝiras
por ilin doni plennizere
al forirontoj al la foro.
Kiel disiĝas ili malespere!

Kun tas' da vino en la mano
kaj sur vizaĝo larmofalo,
aŭdiaŭ diras ili unu la alian
per esprimiva palo.
“Se vi atingos la ĉefurbon
kaj trafos vin en faro
cent ĝenoj, kiam vi revenos
veture per ĉevalo?”

Zhou Zizhi (1082-?)

—laŭ melodio *Perdrika ĉielo*

Iom da restanta ruĝo de lampmeĉo
tuje estingiĝos tute,
la aŭtuna frida spir' atakas
inter pendkurtenojn trude.
En profunda nokto pluvo
batas platanfoliojn gute,
ŝajne jen susure priplorante
senton de disiĝo ĉi-minute.

En spirala incensfum' mi kaj ŝi
plektris la liuton vid-al-vide,
kune ĉantis versojn
laŭ muzikaj tonoj jen ekscite.
Sed nun mi solece restas en loĝejo
dum la ventpluvo nokta falas fride.

Sen aŭskulti al muzika sonoj
miaj larmoj fluas ja perfide.
elĉinigris



Vejdo (Ĉinio)

Anonima (vivanta dum la Song-dinastio)

En la homa mondo

En la homa mondo, kiun prilumas la luno,
kiom da familioj ĝojas, kiom da malĝojas?
Nun geedzoj dormas en la sama litkurteno,
sed aliaj vagas fremdaloke kaj dumvojas.

Du Lei (? - 1225)

Frostas nokte

Frostas nokte. Min vizitas kamarado kara.
Ruĝe flamas karboforno, teo sur ĝi bolas.
Sama sceno: brilas sur fenestrojn luno klara,
sed malsame: kelkaj umefloroj bonodoras.

Zheng Sixiao (1241 - 1381)

Krizantemoj en frostoj

Aparte de aliaj floroj sole vi prosperas
—ĉe heĝo malfortika en aŭtuno— kaj fieras.
Preferus vi sur branĉoj morti en arom' fluida,
ol lasi vin forblovi de kruela vento frida.

Lu Yue (vivanta dum la Song-dinastio)

Neĝofloko kaj umefloro

1.

Ambaŭ por pejzaĝ' printempa estas favoratoj,
bardo ĉagreniĝas: Kiu el du pli valoras?
Umefloro malpli blankas, jes, ol neĝofloko,
tamen ol ĝi, la rivalo, ja pli bonodoras.

2.

Sen neĝo umefloro sin trovas senanima;

vulgara iĝas neĝo sen strofo bele rima.
Vespere versoj venas kaj ree flokoj falas:
el ili nun naskiĝas printempo ja subluma.

Wang Shizhen (1634 - 1711)

Pejzaĝo en Zhenzhou

Preskaŭ fiŝistoj loĝas riverborde, kaj kabanaj
disas ĉe vojo flanke de salikoj, akv-kaŝtanoj.
La suno nun subiras kaj blovetas milda vento,
aceroj ruĝiĝantaj eĥas kriojn pri perk-vendo.

elĉinigris



Minosun (Ĉinio)



Zhuangzi

ĈAPITRO DUDEK-KVARA

Xu Wugui

§25-08

La landlima gardisto Changwu demandis Zilao,
dirante:

“Ne estu neglektema dum via traktado de regnaj
aferoj; ne estu hastema en via regado de la popolo. Iam
mi estis malzorgema en mia plugado kaj la rezulto estis,
ke mi rikoltis malmulton. Iam mi estis hastema en mia
sarkado kaj la rezulto estis, ke mi rikoltis malabundon.
En la postaj jaroj mi ŝanĝis mian manieron de
kampokulturado. Mi plugadis pli profunde ol antaŭe
kaj sarkadis pli zorge ol antaŭe. La rezulto estis, ke mi
rikoltis abundon kaj ke mi havis nutraĵan rezervon
sufiĉan por la tuta jaro.”

Aŭdinte tion, Zhuangzi diris:

“Nuntempe, en la kulturado de sia korpo kaj de sia
menso, multaj homoj agas en la malbona maniero
priparolita de la landlima gardisto. Ili eskapas la
naturon, devias de sia denaska naturo, detruas siajn
naturajn sentojn, perdas sian spiriton kaj sekvas la
vulgarajn konvenciojn. Tial por tiuj, kiuj estas

neglektemaj al la zorgado pri sia denaska naturo, iliaj amo kaj malamo kreskas kiel la herbaĉoj, kiuj invadas ilian denaskan naturon. En la komenco iliaj amo kaj malamo ŝajne helpas fortikigi ilian fizikan formon kaj iom post iom influas ilian denaskan naturon, sed baldaŭ ilia naturo estos ruinigita. Ili havos la korpon kovrita de ulceroj kaj tumoroj, suferos febron kaj nevolan elfluon de spermo.”

§25-09

Iun tagon Bai Ju, kiu studis sub Laŭzi, diris al sia majstro:

“Bonvole donu al mi forpermeson, por ke mi faru rondvojaĝon al la mondo.”

“Lasu tion,” diris Laŭzi. “La mondo estas ĝuste la sama kiel la loko, kie vi nun restas.”

Kiam Bai Ju ree faris la peton, Laŭzi diris:

“Per kiu loko do vi komencos vian vojaĝon?”

“Per la regno Qi,” respondis Bai Ju.

Kiam li atingis la regnon Qi, li vidis la kadavron de ekzekutita krimulo. Li bone kuŝigis ĝin kaj kovris ĝin per sia robo. Poste li vee kriis al la Ĉielo kaj lamentante diris:

“Ho ve, ho ve! Nun la mondo suferas grandan katastrofon kaj vi estas la unua viktimo! Oni ja diras: ‘Ne estu ŝtelisto! Ne estu murdisto!’ Sed, kiam la honoro kaj la malhonoro estas bone difinitaj, oni vidas, kiajn malbonojn ili kaŭzas; kiam la riĉaĵoj kaj komercaĵoj estas akumulitaj, oni vidas, por kio la homoj konkuras inter si. Nun ke tio, kio rezultigas mizerojn, estis bone difinita, kaj tio, por kio la homoj konkuras inter si, estis amase akumulita, la popolo suferas senfinan afliktiĝon kaj grandan mizeron. Kiel do ni povus esperi, ke oni tion eskapos?”

“La antikvaj regantoj atribuis la sukcesojn al la popolo kaj la malsukcesojn al si mem. Ili atribuis ĉion, kio estas ĝusta, al la popolo kaj ĉion, kio estas erara, al si mem. Tial, kiam ajn iu perdis sian vivon, ili retiriĝis kaj faris mempropon. Nuntempe ĉio iras alimaniere.

“La nunaj regantoj kaŝas la veron de aferoj kaj trompas la sensecian popolon. Ili suferigas la popolon kaj riproĉas la senkulpan popolon. Ili altrudas tro pezajn ŝarĝojn al la popolo kaj punas tiujn, kiuj montriĝas nekaptablaj. Ili fiksas celojn tro altajn por la popolo kaj mortigas tiujn, kiuj malsukcesas ilin atingi.

Kiam la inteligenteco kaj la kapabloj de la popolo estas elĉerpitaj, la regantoj traktas la popolon hipokrite.

“Kiam la regantoj hipokrite kondutas ĉiutage, kiel do la soldatoj kaj la popolanoj povas teni sin for de la hipokriteco? Tiuj, kiuj ne estas sufiĉe kapablaj, estas devigitaj sin turni al la hipokriteco; tiuj, kiuj ne estas sufiĉe inteligentaj, estas devigitaj sin turni al la trompo; tiuj, kiuj ne estas sufiĉe riĉaj, estas devigitaj sin turni al la rabado. Pro la agoj de ŝtelado kaj rabado, kiuj do estas riproĉendaj?”

§25-10

Dum sia vivo de sesdek jaroj Qu Boyu sesdek-foje ŝanĝis sian opinion. Ĉiufoje li neis, kion li komence opiniis vera. Estas malfacile diri, ke tio, kion li aprobis en la aĝo de sesdek jaroj, estis ĝuste tio, kion li ĉiam malaprobis dum la kvindek naŭ jaroj.

§25-11

Ĉiuj estaĵoj naskiĝas al la mondo, sed neniu scias ilian originon; ĉiuj estaĵoj estiĝas el ie, sed neniu scias ilian devenon. La homo rigardas alte valora tion, kion lia inteligento povas atingi, sed li ne scias sin apogi sur tio, kion li ne scias, por sciiĝi pri tio, kion lia inteligento ne povas atingi. Ĉu tio ne estas la plej granda konfuziĝo? Ba! ni tion lasu! Tion lasu! Neniu ja povas eskapi la konfuziĝon. Ĉu tio estas la tiel nomata vero? Kaj kie do ĝi estas.

§25-12

Konfuceo demandis la historiografojn Datao, Bochang Qian kaj Shiwei, dirante:

“La duko Ling de la regno Wei tiel diboĉis, ke li neglektis la regadon de sia regno kaj la alianciĝon kun aliaj princoj kaj dukoj. Kial do li povis ricevi la postmortan titolon la duko Ling?”

“Ĉar tiu ĉi titolo konvenas al li,” diris Datao.

“La duko Ling havis tri edzinojn, li kutime sin banis kun ili en la sama kuvo,” diris Bochang Qian. “Sed kiam la historiografo Shi Qiu eniris tien pro urĝa afero, la duko kaŝis sian nudecon kaj ordonis al siaj servistoj akcepti, kion la historiografo alportis, kaj subteni lin per la manoj. Li vivis lascivan vivon, sed li respektis la saĝulojn. Jen kial oni donis al li tiun ĉi titolon post lia morto.”

“Post lia morto,” diris Shi Wei, “oni konsultis aŭguradon pri la loko de lia enterigo. La respondo estas

la jena: Se li estos enterigita en sia familia tombejo, estos sinistre; se li estos enterigita en la monto Shaqiu, estos bonaŭgure. Kiam oni fosis la tombokavon je kelkaj *jen*-oj, oni trovis ŝtonan ĉerkon. Lavinte kaj zorge ekzameninte la ĉerkon, oni vidis surskribon sur ĝi. La surskribo tekstis: ‘Anstataŭ sin apogi sur la posteuloj por prepari la ĉerkon, la duko Ling prenu tiun ĉi lokon kaj loĝu ĉi tie.’ Estas evidente, ke la duko Ling ricevis sian titolon (“Ling” signifas “Dian Revelacion”) jam antaŭ longe. Kiel do la aliaj du historiografoj povus kompreni tion ĉi?”

Elĉinigiŝ



Wang Chongfang

(Ĉinio)

Ĉineske

Jadranka Miric (Serbio)

Klimataj ŝanĝoj

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Somere
sunaj tagoj nin
gajigas. Niaj pensoj
libere vojaĝas.
mi songiŝ. Vi min.

Tage ni
sur riverbordo
ĝuas en freŝa aer’.
Ie fulmis en Nordo
for de dompordo!

Flaviĝis
ora kamparo.
Tritikorikoltado!
Kolektiĝis homaro.
kun teĥnikaro.

Meze de

varmego ekis
pluvoj kaj inundoj.
Altiĝis pluvegoj ĝis
domo.Mortokis’.

Bonaĵo
kaj ĉi malbonaĵ’
ŝanĝiĝas tutsenorde.
Ĉie okazos miraĵ’,
estu fi novaĵ’.

Brulas arbaro

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Ripozas
mi, unu ,du ,tri
horojn. Ekstere ardas.
Soifas aer’. Songi ,
varmon tradormi.

La branĉar’
de tilio jam
bruniĝis. Kurta vivo
de foliar’. Por ĉiam
foriros . Fi larm’.

En ĝia
branĉaro loĝis
gajaj birdoj kantante.
Vento lule salutis
ilin . Noktiĝis.

Ne unu
folio falis.
Ĝia ĉirkaŭaĵ’ verdas.
Nur ĝi dancvente mortis.
Nek ĝi lamentis.

Malgajas
ĉi arda somer’.
Plenas de fumo aer’.
Ekis fajregoj. Ho, Ter’
en granda danĝer’!

*Sopir-al-sudo (ĉine: Yijiangnan): ĉina fiksoforma

poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo xa,xa,a (x=senrima).

Ivanichka Magharova (Bulgario)



La malsama

— Saluton! Kiel vi fartas? Ne ĝenu, kara, mi petas vin! Ĉio al vi pasos bone! Vi estas forta virino. Mi scias tion. — Jes, mi estas forta. Ne turmentiĝu, kara, pri mi! Mi estas preta akcepti malfacilaĵojn. Ne, mi ne timas la doloron. Vi bone scias, ke ĝi estas forgesebla — la virino sopirĝemis, ordigis la kuŝeton por ke estu pli oportune en la lito kaj diris iom maltrankvile — Ĉu vi bone fartas? Ĉu jam resaniĝis via kapo? — Ho, jes! Mi sentas min bone, sed baldaŭ mi ekboniĝos... — el la telefono eksonis vira baritonvoĉo kun ete ironia noto kun kiu parolas Eva, tiel nomas la virino kuŝanta en la hospitala lito. — Mi ĝojas pri via humoro, Moni. Tio signifas al mi, ke vi fartas bone, kara amiko. Sed mi pensas, ke vi devas konsulti kun doktoro ĉar via longa kapidoloro ne estas normala. Mi same pensas ke vi bezonas longan ripozon. — Vi estas prava! Mi obeos vin! — post kelkaj sekundoj da silento el la telefono denove eksonis la voĉo de Simeon. — Ni devas fini nian parolon, ĉar iu sonoras ĉe la pordo. Mi telefonos al vi morgaŭ, antaŭ operacio. Ĝis baldaŭ. La telefono kavazaŭ ekklakis kaj la voĉo de la viro perdiĝis. En la hospitalĉambro estis ankoraŭ pacientinoj kaj ili same devigite operacios. Ŝi ne demandis la virinojn kiaj estas iliaj problemoj. Ili venis tagmeze, sed ŝi ne havis deziron paroli kun malsanulinoj. La pensoj de Eva post la parolo kun Moni ekiris al alia direkto. Estis antaŭ kelkaj jaroj kiam ŝi renkontiĝis kun Simeon dum la konferenco. Ĝia temo estis pri la preteco de la socio akcepti la malsamajn kaj ilian rajton manifesti libere siajn pensojn. En plene salono estis brua kaj oni povis vidi multajn starantojn. La bruo eĉ malhelpis aŭskulti bone al la sidantoj en la lastaj vicoj. Li ne iris al la tribuno, stariĝis kaj diris sian nomon. Ŝi rapide trovis la nomon en la programo kun la nomoj de la raportantoj, kiuj diskutos la temon. Docento Simeon Georgiev – biologo, administrato pri katedro “Biologio” en la Medicina akademio en Vieno,

Aŭstrio. Tio estis informo pri li en la programo. Ne estis precizigita kies reprezentanto li estis aŭ Georgiev reprezentos sin mem.

Li estis alta viro, belstatura, blondharara, sed kun brunaj okuloj, longforma vizaĝo kaj helhaŭto sed brunigita de la suno. Estis ĉirkaŭ tridek kvin aŭ kvardek jara viro. Li komencis paroli en perfekta angla lingvo. — Mi estas biologo, sed mi nun ne parolos kiel scienca laboristo. Mi deziras paroli pri tiu ĉi problemo de alia vidpunkto. Mi havis fraton samseksamulo. Li jam iris en pli bonan universon. La bruo en la salono haltis kaj plej parolantaj ekrigardis al la eleganta viro, staranta en la mezo de la konferenca salono. La homoj sidantaj antaŭ li turniĝis por vidi lin. — Venu al la scenejo! – la prezidanto invitis lin. — Dankon! Kaj de ĉi tie ili aŭskultos min, kiuj volas tion. Mi parolas alte! — La salono iom ekbruiĝis, sed rapide revenis la silento. - Jes, li foriris de tiu ĉi mondo. Kaj li estis tre bona, bela kaj tre talenta. Mia frato ne povis travivi sian propran malsamecon. Mi deziras rakonti al vi lian historion, lian sorton. Ljuboslav estis lia nomo, sed ni nomis lin Ljubo. Li estis je dekdu jaroj pli aĝa ol mi. Mi estis malgranda kiam mia frato ekveturis en grandan urbon por lerni. Li pentris tre bone, ne laŭ lia aĝo estis liaj pentraĵoj. Lia instruisto pri pentrarto diris, ke li havos brilan karieron se li daŭrigos sian studon en la Akademio. Mia patro estis skeptika, dubis kaj ne kredis tion, kaj ne deziris ke mia frato estu pentristo. Neserioza laboro estas tiu ĉi pentrarto – diris mia patro. — La profesio de la inĝeniero estas renomita.” Li murmuris, sed pro la premo de mia patrino li konsentis. Ili registris lin. Mia frato estis tre feliĉa. De kie li heredis tiun ĉi kapablon, mi ne scias, sed ĉiam estis novaj bildoj sur la muroj de niaj ĉambroj. Komence li pentris sur la folioj de pentrobloketo per akvofarbetoj /akvarelo/ kaj poste per tuĉo kaj la lastaj tre similas al grafikaĵoj. Ni, la infanoj de la ĉirkaŭaĵoj, ludis per pilko, piedbatis, saltis, eĉ faris korbbon por trejni nin korbopilkon. Kaj li ankoraŭ pentris aŭ aŭskultis muzikon el la kasedoj kiujn li aĉetis per ŝparegaj stotinkoj* de la matenmaĝoj. Li ofte sidis sur la balkono pensante kaj iel malĝoja. Proksime de nia domo en la kvartiro vivis luanto. Li estis

fotografisto. De kie li venis, kaj kiu li estas neniu scias. Ekloĝis en somerkonstruaĵo de la onklino Donka, vidvino kaj seninfana. Ili kun onklo Petro prenis de ilia parenco knabineon por kreskigi ŝin kaj poste ŝi zorgu pri ili. Sed Radka, tiel nomiĝis la knabineo, frue maturiĝis kaj frue edziniĝis. La edzo estis junulo el urbo kaj ne ekdeziris esti bofilo, ĉar li estis nur unu filo de siaj gepatroj. Kaj malhelpi la feliĉon de Radka onklo Petar kaj onklino Donka ne aŭdacis. La amo de Radka kaj Plamen kortuŝis geonklojn. Kaj ili, la gejunuloj, vivis kun siaj gepatroj en la urbo kie ili havis pli grandajn ŝancojn por solvi, por trovi taŭgan laboron. Post kiam onklo Petro mortis onklino Donka restis sola. Ŝi prenis luanton por ne esti sola. La gejunuloj venis vidi ŝin de tempo al tempo, sed ili rapide revenis hejmen. Al ĉi tiu fotografisto, Evtim estis lia nomo, la junaj knaboj kunvenis. Ankaŭ estis knabinoj sed malpli. La patrinoj ne permesis al ili. Ili zorgeme pririgardis la knabinojn. Evtim estis ĉirkaŭ kvindekjara. Oni diris ke li estas maljuna fraŭlo. Li faris fotojn de homoj dum naskiĝtagoj, ferioj kaj funebroj por la memoro. Mia frato, jam studento, ofte iris tien, speciale en la somero kiam li revenis dum la ferioj kaj havis pli da tempo. Tiam li restis tutan tagon kun Evtim. Sed mia patro ne tre ŝatis ĉi tiun amikecon. Li kverelis al mia frato kaj minacis, ke malpermesos al Ljubo senokupe esti ĉe tiu “vagabondo”, kiel nomis lin mia patro. Mia frato pravigis sin, ke la fotografisto faris artverkojn tio estas nomita Fotografarto kaj li estas instruisto pri pentrado pri kiu li studis. Mi preterlasis diri, ke Evtim estis instruisto en loka baza lernejo. Tiel mia frato pravigis la kontaktojn kun li antaŭ paĉjo. Pasis kelkaj jaroj de kiam Evtim ekloĝis en nia urbo, dum la somero la loĝantoj ekparolis ke li estas pederastulo, tiel la homoj nomis la malsamajn. De kie ili eksciis, mi ne scias, sed la reago de la homoj estis rapidega. La gepatroj de la infanoj, kiuj vizitis la fotiston, reagis plej akre. “Li estas kontaĝa”. “Li ankaŭ infektos niajn infanojn.” “Tuj li foriru el la urbo”. “Kiel eblas, ke tiu persono povas esti instruisto?”. “Honto!”. “Eksteren el la lernejo, eksteren el la urbo!”—tiuj krioj estis aŭditaj. Ekzistis homoj, kiuj defendis lin, sed ili estis malmultaj kaj liaj argumentoj, ke tio ne estas kontaĝa

malsano, sed genetike reprezentita problemo ne trankviligis la socion en nia malgranda urbo. Kaj mia patro estis la plej sovaĝa rilate al atakoj kontaraŭ Evtim. Li eĉ proponis organizi grupon, kiu devigu lian forpelon! Panjo provis trankviligi lin, sed tio faris lin pli ambicia. Iun nokton granda skandalo eksplodis en nia hejmo kiam mia frato klopodis protekti la fotiston per argumento, ke tio ne okazas pro la deziro de la individuo sed estas fiksita de liaj genoj. Li eĉ klarigis per ekzemplo, ke niaj najbaroj antaŭ jaroj havis kapron ambaŭsekseman. Ĉio tio estas biologio.

—Vi silentu! Kia biologio! Ekde la tempo de Adam kaj Eva viro kaj virino estis kreitaj por ke ili daŭrigu la homaran genton, por ke estu homoj sur la tero. Ĉi tio estas peko! Kaj mi ne aŭdu vin parolantan tiel, protektantan lin kaj vi ne iru plu al Evtim. Degenerinto! “Fotografisto. Pentristo” —masko sub kiu li kaŝis. Ankoraŭ morgaŭ mi organizos grupon por forpeli lin de nia urbo! Ne parolu! Ĉu vi instruas min! Ljubo, mia frato silentis, sed ŝajnis al mi, ke li estis timigita. Mia patro ne organizis siajn sampensantojn la sekvan tagon ĉar ni eksciis, ke Evtim estis forkondukita ien dum la nokto. De ĉi tiu tago ŝanĝiĝis mia frato. Li estiĝis fermita, ne kontaktis aliajn. Li pentris malmulte, sed liaj pentraĵoj estis malserenaj, eĉ mi dirus malbonsignaj. Mi klopodis paroli kun li. Sed Ljubo nur ŝvingis la manon, turnis la kapon kaj en liaj okuloj mi vidis larmojn. Nur unufoje li diris al mi. “Ankoraŭ ege juna vi estas por kompreni la tragedion de tiuj homoj, sed vi devas scii, ke nia patro ne estas prava! Memoru, mi petas, tion! Sed la temo pri homoseksualismo ofte ĉeestis hejme. Mia patro ne povis akcepti ke tiu viro estis instruisto, kiu havis kontaktojn kun la knaboj en la ĉirkaŭaĵo. Mia patrino silentis. Ŝi ne kontraŭdiris. Sed mia frato forlasis la ĉambron. Ne pasis ankoraŭ dudek tagoj kiam iun vesperon mi aŭdis kverelon inter miaj gepatroj. —Tio ne povas esti vero! — mia patro kriis. — Jes, vere — mi aŭskultis mallaŭtan voĉon de mia patrino. — Vi mensogas al mi! Mi ne kredas vin! —Mi diras al vi la veron! — Kiu diris al vi? — Ne necesas, ke iu diris al mi. Mi estas patrino, kaj mi sentas per koro kio estas vero, kio ne. — Tio estas inaj stultaĵoj! — estis rapida respondo de mia paĉjo. — Ne estas inaj

stultaĵoj. Tio estas la vero, li dividis kun mi. Multe Ljubo ploris kaj timis pri si mem. — Kio? Mia filo pederastulo? Vi frenezas! — Bonvolu ne krii! La infanoj aŭdos vin!

— Kie li estas? Mi mortigos lin! Mi, lia patro, per siaj propraj manoj, mortigos lin! Mi sciis, ke tiu fotisto nur kaŭzas al ni problemojn! Mi trovas kaj likvidos lin! — Bonvolu ne krii, mi petas vin! La infanoj aŭdos nin! Mi promesis ne diri al vi, sed... Vi devas scii! Mia frato, kun kiu ni estis en la ĉambro, rapide stariĝis de la seĝo kaj rapide paŝante iris al la pordo. Li fermis ĝin malantaŭ kaj mi aŭdis bruon de la fermiĝinta pordo. Ljubo ne revenis ĉi nokte. Mia patro malpermesis al panjo serĉi lin. Li ne revenis sekvan tagon. Panjo ploris, kaj mia patro malbenis Evtim-on. Kiam la venontan tagon li ne venis, patrino iris al la milicio, por raporti lian malaperon. Ili trovis lian korpon sur la rokoj. Li ĵetis sin en la abismon, sed alkroĉis sin al iuj arbustoj, kiuj pendigis lin super la abismo. Kiom longe li estis tie? Ĉu jam li mortis aŭ ankoraŭ estis duonviva, kaj ni ne komprenis? Panjo malsaniĝis kaj forpasis frue. Mia patro iĝis drinkulo. En la salono regis silentego. Nenia aplaŭdo estis aŭdita.

“Jes, tiam mi konatiĝis kun Simeon kaj ĉi tio starigis komencon de nia longdaŭra sincera amikeco. Aligis nin la kaŭzo — toleremo kaj amo al la proksimulo! Sed sen defiladoj kaj paradoj de la malsamaj, sed komprenante la problemojn kaj klerigon! Eva fermis okulojn kaj daŭrigis fadenon de siaj memoroj.

* 1-100% ero de la bulgara levo

Fratoj Grimm

Povra knabo en tombo

Estis iam povra paŝtista knabo, kies gepatroj mortis. Tial aŭtoritato donis lin en la domon de riĉa viro, kiu havis la taskon nutri kaj eduki lin. Sed la viro kaj ties edzino estis malicaj homoj, spite al sia riĉo ili estis avaraj kaj misfidemaj kaj ĉagreniĝis, se iu metis mordajon de ilia pano en la buŝon. La povra knabo

povis fari ion ajn, tamen li ricevis nur malmulte da manĝo, sed des pli multajn batojn.

Iutage li devis paŝti kokinon kun ties idoj. Sed la kokino eraris pri la vojo kaj iris kun siaj idoj tra latbarilo, kaj tuj akcipitro ĵetiĝis de supre sur la kokinon kaj forrabis ĝin aeren.

La knabo kriis tiel laŭte, kiel li povis: „Ŝtelisto, ŝtelisto, fripono!“

Sed tio ne helpis. La akcipitro ne redonis sian predon. La viro aŭdis la bruon, alkuris, kaj kiam li aŭskultis, ke lia kokino forestas, li ekkoleriĝis kaj traktis la knabon per hajlo da batoj tiom, ke li tute ne povis moviĝi dum kelkaj tagoj. Nun li devis gardi la kokidojn sen la kokino. Sed jen la embaraso estis eĉ pli granda, unu el ili kuris tien kaj la alia tien ĉi. Jen li supozis, ke li agas saĝe, se li kunligos ĉiujn per ŝnuro, ĉar tiukaze la akcipitro ne povas ŝteli iun el ili. Sed li tute eraris.

Post kelkaj tagoj, kiam li estis tute laca de la kurado kaj la malsato kaj ekdormis, venis la rabobirdo kaj kaptis iun el la kokidoj, kaj ĉar la aliaj estis firmligitaj al ĝi, li forkaptis ĉiujn, flugis sur arbon kaj voris ilin. La kamparano ĵus revenis hejmen, kaj kiam li vidis la malfeliĉon, li fariĝis tute malica kaj batadis la knabon tiel senkompate, ke li devis kuŝi kelkajn tagojn en la lito.

Kiam li ree surpiediĝis, la kamparano diris al li: „Vi estas tro stulta, mi ne bezonas vin kiel gardiston, vi estu mia heroldo.“

Li sendis lin al la juĝisto, al kiu li devis porti korbon kun vinberoj, kaj aldone li ricevis leteron por la juĝisto. Survoje malsato kaj soifo turmentis la knabon tiom, ke li manĝis du berojn de la vinberoj. Li portis la korbon al la juĝisto, kaj kiam tiu legis la leteron kaj kalkulis la vinberojn, li diris: „Mankas du vinberoj.“

La knabo tute honeste konfesis, ke li manĝis la du mankantajn vinberojn, pelate de malsato kaj soifo. La juĝisto skribis leteron al la kamparano kaj postulis ankoraŭfoje la saman kvanton da vinberoj. Ankaŭ tiujn la knabo devis porti kun letero al la juĝisto. Kiam li denove tiom forte malsatis kaj soifis, li ne povis helpi al si alie ol per tio manĝi denove du vinberojn. Sed li prenis antaŭe la leteron el la korbo,

